

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

## ATENTIGO AL ESP. GAZETOJ!

Okazas tre ofte, ke al niaj redakcio kaj administracio estas sendataj gazetoj kun falsa adreso. Tial ni atentigas, ke la ĝusta adreso de nia redakcio estas: Plzeň, Radyňská ul. Adreso de la administracio estas: Plzeň, Prokopova tř.

»LA PROGRESO«.

## EN LA SESAN JARON!

»La Progreso« eniras en la sesan jaron de sia ekzisto, do ĝi atingas aĝon, kiu ĉe naciaj gazetoj esp. estas nur malofta. Bedaŭrinda simptomo de nia movado estas, ke niaj samideanoj en sia majorito estas tre fervoraj en subtenado de novaĵoj — ĉefe de novaj gazetoj, sed bedaŭrinde ili estas tre avaraj en subtenado de malnovaj — eĉ vere bonaj gazetoj, de veraj pioniroj de nia movado, kiuj pene kaj senprofite »fosas nian sulkon«.

Tiu ĉi forĵetinda simptomo karakterizas esperantistojn de preskaŭ ĉiuj landoj. Ni serĉu nur en la diverslanda gazetaro esp. kaj ni trovos, ke sole nemultaj landoj havas sian nacian esperantan gazeton, kiu estas daŭre subtenata de enlandaj samideanoj, aŭ kies ekzisto kaj prosperado ne estas minacata de subfosaj laboroj de malkontentuloj. Jen dolora vundo sur la korpo de nia movado nacia eĉ internacia.

Kaj ni estu sinceraj: Ne estas kaj ne estis alie ankaŭ en nia lando. Ni komencu kio ajn, sed estas certe, ke post ioma sukceso perdiĝos intereso de niaj samideanoj kaj ke samtempe trovos sin personoj, kies opinion kaj ambicion oni ne sufiĉe atentis, kiuj penas bagateligi la tutan entreprenon, malhelpi ĝin kaj senigi ĝin de simpatioj de serioza esperantistaro. Tiu ĉi fatala malsano jam entombigis en nia movado vicon da bonaj entreprenoj, kiuj meritis energian helpon kaj subtenon de la enlandaj esperantistoj. Ni estas bonaj kaj admirindaj komencantoj, ĉiam naskiĝas novaj planoj, novaj projektoj, novaj entreprenoj, novaj gazetoj. Ekflamas entuziasmo por ili, kiu post kelkaj semajnoj aŭ monatoj estingiĝas por ĉiam.

Ankaŭ »La Progreso« jam havas siajn spertojn, spertojn tre dolorajn, kiuj profunde tuŝis ĝian prosperon. Ni volas fari riproĉojn al neniuj, sed senĝene ni diras: se la personoj, gvidantaj »La Progreson« estus malpli fervoraj, ĝi ne plu estus aperinta kaj eble la ĉeĥoslovakaj esperantistoj nuntempe estus uzantaj la servojn de germana gazeto »Esperanto Triumfonta«, kiel de sia centra organo — laŭ rekomendado kaj ekzemplo de kelkaj ĉeĥaj esperantistoj.

Do, ni eniras en la sesan jaron kun sentoj diversaj kaj sen novaj projektoj. La programo, kiu gvidis nin en jaroj pasintaj, nin kondukos ankaŭ nunjare: »La Progreso« estos gazeto laboranta ne por personaj gustoj, sed por bezono de tuta ĉeĥoslovaka movado esperantista kaj de unuopaj esp. societoj. Ĝia spirito estos esperanta kaj ĉeĥoslovaka. Ĉiu leganto povas esti certa, ke laŭeble ni penas helpi al li en liaj poresperantaj bezonoj.

Al niaj ĝisnunaj amikoj ni sincere dankas por ilia ĝisnuna helpo kaj ni petas konservi al ni la simpatiojn ankaŭ en la kuranta jaro.

ooo

RIEDL:

## NOVA JARO.

(Al s-ino M. K.)


Ekstere vento frosta super domoj,  
mistera, lasta nokto sur la ter',  
kaj kiel gemoj, bluaj, belaj perloj  
briletas steloj en supera sfer'.

Kaj en la tonoj de la gajaj kantoj  
sincera preĝo vibras en aer',  
ni sentas novan forton esperante:  
pli bona jaro estos sur la ter'.

Ĉirkaŭe sonas voĉo sonorila,  
naskiĝon sanktan festas la homar',  
eĉ ni amike vokas ĝin — kaj kore:  
»ho venu nur, vi esperdona jar!«

Nun ĉiu sentas amon en la koro,  
en ĝi ekreĝis trankviliga flam',  
ĉar iris for por ĉiam la doloro,  
kaj ĝojo venis en la ejon jam.

Kaj kiel larmoj brilas freŝa neĝo,  
sur tero kuŝas flava foliar',  
en anim' homa vibras gaja preĝo,  
ĉar venis jam al sojlo nova jar'!



AUGUSTIN PITLÍK.

**Augustin Pitlík**, ĉefkomisario de ĉs. komerc-ministerio, la nova lektoro de Esp. ĉe la alta teknika lernejo en Praha. Nask. la 24. jul. 1883 en Bavorov. Esperantisto li estas de jaro 1903. Post studoj de fil. ĉe la ĉefia univ. de Praha li estis prof.-suplento ĉe la mezaj lernejoj en Klatovy, Příbram, Prostěj-

## FELIETONO

V. HENDRIX, Gent:

### IMPRESOJ PRI ĈEĤOSLOVAKIO.

Nun mi ion skribos pri Bohemujo. Sed antaŭ ĉio Vi devas indulgi min, ĉar mia kapo, plena je diversaj aferoj, ne permesos al mi kviete esprimi miajn vagantajn pensojn. Bonordo ne estas kvalito de mi, de ĉi-tiuj linioj.

Pritraktante miajn spertojn pri Ĉeĥoslovakio dum vojaĝo tra ĝi, mi unue devas atentigi, ke la ĝenerala bona kaj favora impresoj, kiun mi konservis kaj ĉiam konservos pri ĝi, estas laŭ mi la rezultato de du faktoroj, kies influo estus malfacile disigebla: nome la popola karaktero, kiun mi penas pli detale pritrakti ĉi-sube, kaj mia kono de esperanto. Kiu el ambaŭ faktoroj estis pli grava por agrablighi al mi la restadon en la nova respubliko? Mi preskaŭ ne povas decidi kaj antaŭ ĉio mi volas atentigi pri tio, ke mia esperantisteco kaŭzis jenan strangan fakton. Mi vivis, efektive vivis, kiel mi klarigos poste, kun kelkaj amikoj, kvazaŭ mi estus vivanta inter samlandanoj, geamikoj aŭ eĉ samfamilianoj, kvankam mi antaŭe neniam vidis ĉi-tiujn gesamidanojn. Mi diras: stranga fakto. Jes, certe ĝi estis stranga, ĉar je la komenco mi tute ne konsciis pri

ĵov kaj Plzeň. Liaj ĉefaj laboroj estas: Propaganda parolvojaĝo tra eŭropaj ŝtatoj en 1912—1913, dum kiu li esp. paroladis pri »Praha, sokolaro, naciaj vestoj kaj natura beleco de ĉs. landoj« en 33 urboj, vastigante tiel la famon pri nia lando kaj samtempe montrante la praktikecon de Esp. Dum la XII. kongreso en Haag li faris paroladon pri Praha (kun lumbildoj) invitante la XIII. al Praha. Dum tiu ĉi kongreso li estis ĝia ĝenerala sekretario. — Kiel ni private sciigas, la profesoro de la ĉefia universitato en Praha en la lastaj tagoj proponis lin ankaŭ por la universitata lektoro de Esp. — A. P. preparas nun eldonon de granda lernolibro de Esp. por Ĉeĥoj. Nia movado atendas de li ankoraŭ multajn sukcesojn.

ooo

JOS. HOFMAN:

### NOVJARA FABELO.

(Originalo.)

Sankta Petro dissemadis ĵus la neĝo-blankajn florojn sur teron, malsata ĉiela birdaro serĉis rifuĝon en nestoj elsternigitaj per neĝa plumaro, kaj al pompa palaco de reĝo, pri kiu oni rakontis proksime eĉ malproksime, ke li ne maljuniĝas kaj neniam estos mortinta, lamis apogante sin per bastono, griza maljunulo en longa vesto kun valizo sur dorso. Norda vento pikis la maljunulon senkompate en vangojn kaj grandaj neĝeroj fiksigantaj sur lia longa barbo donis al li aspekton de glacia viro. Kiam li eniris tra flanka pordego en kastelon de reĝo »Tempo«, eĉ ne unu hundino ekbojis. Li lasis sin avizi, kaj kammerservisto englilita senbrue en la reĝan akceptejon, raportis serveme: »Via reĝa Moŝto, la plej alta administranto Silvestro petegas

ĝi. Kaj estis nur iom post iom, ke penetris en mian cerbon la ideo: S-o Ráž — li ja permesu, ke mi citu lin — estas Ĉeĥo kaj mi estas Belgo. Ĉu estas videbla diferenco? Ho, kiel esprimi tiun senton! Vortoj ja ne ebligas tion al mi. Kaj ŝajnis al mi, ke estas ja nur dank' al esperanto, ke ni povis — ho, benata feliĉo — eksenti tiun sanktan harmoniecon inter homaj koroj, kiuj sin komprenas. Tiu edifa sento efektive estas inter la plej memorindaj spertoj de la vojaĝo. Sed estas ja kun interna kontenteco, ke mi povas certigi, ke ankaŭ neesperantistoj impresis min per samspeca afableco. Dum eniro Bohemujon neniu malfacilaĵoj estigis dank' al esperanto-delegito s-o Hell. La fakto estas notinda kaj dankinda. Kaj jen komencis la sperto, la esploro de ĉefaj moroj kaj karaktero. En Wilsonovo nádraží, malgraŭ la superŝutiteco de la deĵorantaj oficistoj libervolaj mi tuj povis sperti la afablecon boheman, de kiu mi nun dependis, ĝis kiam mi estis alveninta en bonan havenon. Mi ja posedis planon kaj vojklarigon, sed... ne konis la lingvon. Per iom da esp-ista helpo kaj kvankam ne komprenante la tramkondukanton, mi komprenis tamen tiom, kiom necesis por fine alveni ĉe la tiel afable prizorgita privata loĝejo. Por ne esti devigata je ripo, mi tie ĉi notas, ke ĉiam sen escepto, mi plej serveme estis flegata de la tramkondukistoj, kiuj ŝajnas al mi treege sindonaj al fremdujoj, ankaŭ

afablan aŭdiencon.« La reĝo kuntiris konvulsie siajn longajn brovojn, donis mansignon kaj la maljuna Silvestro eniris kun kliniĝinta nuko, tenante en ambaŭ manoj grandan meslibron, kies ruĝa kovrilo estis jam sufiĉe senkoloriĝinta.

»Ĉu vi scias, Silvestro, kial mi vin alvokis hodiaŭ en mian palacon?« — »Mi aŭdis bedaŭrinde inter la popolo, ke via reĝa moŝto intencas eksigi la maljunan Silvestron el siaj servoj.« — »Jes, mi sciigis konfideme, ke la patro Silvestro ne plenumas, same kiel liaj antaŭuloj, la dezirojn de mia popolo kaj tial mi estas devigata elpeli laŭ fera rajto mian plej altan administranton, ĉar li kaŭzis senfruktan regadon kaj eventuale lin mortpuni, se li estas trouzinta mian konfidon.« — »Tie ĉi estas la ŝuldata libro«, respondis la maljunulo kun tremanta voĉo kaj li donis la fatalan libron al la reĝo. Ĉi tiu turnis unuan folion, la duan, trian ..... kaj senĉese li ridetis kontente. Ĝi estis folioj de bonfaroj. Petoj kaj deziroj de regatoj, kiuj estis enskribitaj maldekstre per nigra inko, estis troveblaj kiel plenumitaj dekstre, ruĝinke notitaj. Sed ju pli longe foliumis la reĝo, des pli multe malaperadis la dolĉa rideto de liaj lipoj kaj lia serioza mieno komencis malklariĝi.

»Kion mi vidas!« ekkriis la reĝo. »Kial tiom da malriĉuloj vi lasis morti pro malsato? Kial la folioj dekstraflanke estas malplenaj?« — »Pordonu, reĝa moŝto, ĝi estis pleje vagistoj, homoj, kiuj evitis laboron kaj volis vivi el la

riĉeco de inteligentuloj. Ili petadis min pri aferoj rekte maleblaj. Por helpi al tiuj, kiuj pro malsaneco kaj maljuneco ne povis labori, mi ne havas sufiĉe da forto. Kontraŭ aĝo nek kuracilo, nek saĝo.« — »Kiel vi senkulpigas mortojn de tiom da miloj, kiuj apud fajraj fornoj, sub leviloj de elektraĵaj maŝinoj kaj sub radoj de ruinigaj lokomotivoj mizere pereis?« — »Ne mia kulpo, sed kulpo de administranto «Progreso», al kiu via moŝto bonvolis doni nelimititan potencon antaŭ multaj jaroj.« — »Kial tiom da geamantoj vi lasis malfeliĉe morti, kial vi ŝiregis senkulpajn infanetojn el patrinaj brakoj? Ĉu vi ne scias, ke la amo estas la unua leĝo de homaro, ke ĝi en ĉielo tronas, sur la tero regas kaj zeniton kun centro de terglobo per montoj proksimigas? Kion vi respondos al mi pri tio?« — »Pardonu, via reĝa moŝto! Miaj sekaj okuloj tre ofte larmojn elverŝadis kaj mia maljuna koro pro doloro krevadis, kiam mi devis senpove rigardi, kiel geamantoj de juna vivo liberigis el varmega ĉirkaŭpreno kaj kiel multegaj infanoj per insidaj morboj sufokataj, senkulpe mortadis sub kisoj de patrinoj ilin adorantaj. Je morto de geamantoj ne estas kulpa mi, sed iliaj gepatroj kaj tiuj, kiuj la junan, sinceran amon malhelpadis. Ke tiom da infanoj pli frue la mondon forlasis ol ili ĝin povis ekoni, pro tio estas kulpa eterna leĝo, kiun via reĝa moŝto iam bonvolis sankcii. Tamen estas skribite en la antikvaj libroj de miaj antaŭuloj: »La mondon tenas la amo kaj la amon la mondo, ĝin venkas sole «Morto» kaj tiu estas eterna problemo.«

evidente al samlandanoj. Sciuj kaj memoru ĉiam, ke la plej stranga, mi preskaŭ dirus enuiga afero en fremdlando estas la nekonado de la lingvo.

Jen mia unua paŝo en mian kongresan loĝejon: je mia modesta frapo virino malfermis kaj je kelkaj vortoj germane balbutitaj de mi, la ĉefia virino respondis, ho, per ĉefa lingvo! Ne sciante, kiel min savi, mi insistis — vane — per germana lingvo. Mia mastrino ne komprenis min nek mi ŝin. Imagu, imagu al Vi, se Vi povas, la senesperan situacion, kies finon mi ne antaŭvidis. Tute senespera ĝi tamen ne estis, ĉar la bonveniganta mieno de la virino kaj la ridemaj vizaĝoj de la knabinoj — kiuj ankaŭ nenion komprenis — kuraĝigis min kaj fine mi kune ekridis... Pro kio? La rido ja ne savis min kaj mi tre bone memoras, ke je tiu momento mi ja pli volonte estus esplorinta. Pro kio? Ĝis kiam tio estus daŭrinta, mi ne scias, sed mi finigis reciproke rigardadon kaj nekomprenigantan interparoladon per forkuro al la policojo, kie per afabla lingva perado fariĝis la interkonatiĝo, la unua interklarigado. Ĉi tie rompiĝas la fadeno de mia rakonto...

Mi nun daŭrigos citante ankoraŭ kelkajn faktojn, pruvojn de ĉeĥoslovaka servemo. Mi estis ankaŭ tutkore akceptita de Praha-a familio Štěrba, parolante ĉu esperante ĉu france ĉu germane. En Beroun, kiel mi jam aludis, atendis min vera familia vivo de gesinjoroj Ráž, kie plej agrable paŝiĝis tri tagoj per vizito ĉu de la urbo, ĉu de la mezepokaj

kasteloj Karlův Týn kaj Krivoklát, ĉu de la blinda elektroteknikisto s-o J. Nosek. Kelkajn vortojn mi volas aldoni pri mia konatiĝo kun s-o Nosek, la simpatia blindulo. Kia »ora« koro diveniĝis malantaŭe la nigraj okulvitroj! Kiel la natura bonkorereco sin montris per la radiaĵ trajtoj! Kiel valora rememoraĵo mi ĉian konservos la malofitan donacon, pendantan ĉiam ĉe mi en mia skriboĉambro. Kaj dum forveturo el Beroun ŝajnis, ke restis tie io de mi. Troa emocio pro la travivitaĵoj liberigis larmojn el miaj okuloj. Tamen mi veturis al nova ĝojego, al Jičín. Ĉie, ĉie mi devas ripeti la samon, afablecan akcepton ĉe la nekonata sinjorino kaj ĉe familio Šikl, ne forgesante miajn maljunajn amikojn kaj ankaŭ post ĉi-tiea adiaŭo ripetigis la familia akcepto ĉe s-o Haase en Liberec. Jes, kiel mi diris, la esperantisteco ludis gravan ludon dum mia vojaĝo. Tamen mi senhezite konfesas, ke, se ne estus la lingva malfacilaĵo, mi sentime revenus al Ĉeĥoslovakujo plenfide je popolo, ĉar mi ja, kvankam nemulte, povis sperti ĝian kvietaniman karakteron, ĝian pacemon kaj internan varman vivon. La moroj estas certe pli liberaj ĉe Vi ol ĉe ni kaj kiam mi diras liberaj, mi pensas: pli simplaj, pli naturaj, pli decaj. Kaj je tio oni ja ne povas dubi, kiam oni estas vidinta la grandan sokolan organizacion. Mi bedaŭrinde nur vidis la sennombran marŝadon, ne la ekzercadon, je kiu partoprenas knaboj kaj knabinoj, virinoj kiel viroj, eĉ gemaljunuloj! Nepre: sana menso en sana korpo estas! Certe unu po-

La reĝo ekmeditis, kunpremis konvulsie la lipojn kaj silentis. Silento daŭris longe. . . . . Post momento eksonis en ĉambro senkuraĝa frapado sur la pordon. La kamerservisto eniris kaj anoncis: »Junulo nekonata, sed tre ĉarma, nome »Nova«, petas afablan aŭdiencon.« — »Li eniru«, sonis la ordono. La pordo malrapide malfermiĝis kaj majesta junulo kun lakto kaj rozo sur vangoj, kun fajro en okuloj kaj kun mielo sur lipoj eniris, stariĝinte antaŭ la reĝo. La reĝo Tempo forĵetis libron de la patro Silvestro. »Kion vi deziras, junulo?« — »Mi permesas al mi proksimiĝi al tiu ĉi nedetruenda trono, esperante, ke bona reĝo metos la oficon de plej alta administranto sur min. Mi estas direkta posteulo de Silvestro kaj mi volas forviŝi pekojn de li faritajn.« — »Kompatu min, reĝo,« plendis Silvestro, »permesu, ke mi ankoraŭ unu monaron povu administri vian regnon kaj mi ĉion plibonigos.« — »Neniam«, ekkriis la reĝo. »Laŭ fera rajto vi devas morti. Sed ĉar mi rimarkis, rigardinte vian ŝuldlibron, ke vi krom multaj eĉ grandaj malbonoj tamen havis unu klopodon por provizi homaron per biero kaj vino, ĉar vi konstruadis la tutan jaron nur bierfarejojn kaj vigle zorgis pri vinfarado, mortu honorinde laŭ kutimo de antaŭuloj per drono en biero kaj vino, meze da karnavalo dum sonado de trompetoj kaj tamburoj. La ekzekuto estu efektivigita hodiaŭ je la noktmeza horo!« — Li poste sin turnis al la ĉarma junulo kaj donante al li luksegan ruĝan libron kun ora rando, kiu ĝis nun kuŝis apud liaj piedoj, li diris: »Jen prenu, tronsekvanto, kaj ĵurpromesu, ke vi konsciencie volas plenumi ĉiujn dezirojn de mia kara popolo, por ne

polo povas multe lerni de alia kaj nur je la mora vidpunkto Ĉeĥoslovakujo superas mian propran landon. Cetere la dolĉa karaktero, la nekoleremo estas klare pruvita per la dolĉeco de la lingvo mem, kiu agrable kaj flue sonas (tamen ege stranga estas por fremdulo). Ho, mi bedaŭras, ke la vetero estis... ĉeĥoslovaka ankaŭ! Kiel varmege! Mi ne kutimis je tio, kaj kvankam vestita per okaza ampleza vojaĝkostumo, la efiko estis tia, ke mi ne kuraĝis moviĝi kaj preskaŭ ne povis esplori la ĉeĥan vivon, krom la jam cititaj okazoj.

Certe je nova vizito (Dio scias, ĉu iam ĝi okazos) mi ja volonte ekzamenus kaj partoprenus la veran ĉeĥan vivon, ne kiel iaajn kongresano, sed kiel simpla kunvivanto, sen irado kaj kurado al festoj, nek festenoj, nek speciale organizitaj okazintaĵoj, sed kviete ĝuante ĉeĥan vivon! Tiamaniere mi ja pli facile penetras la allogantan karakteron de la juna nacio, kaj mi povus doni pli ĝustan opinion pri ĝi. Pri la naturbelaĵoj, tiel riĉe dissemitaj, mi ne kuraĝas ekprovi priskribon (vidu Karlův Týn); ili estas tro multenombraj kaj vi ja ĉiuj pli bone ilin konas ol mi mem. Mi do finas ĉi tiun babilaĉon petante afable pri pardono pro la sentalenta rakontado.

Jen do miaj impresoj! Pardonu, se ili ne estas interesaj!

meriti la saman sorton kiel via antaŭulo. Kiel folioj de tiu ĉi libro estas blankaj, tiel blankaj kaj puraj estu ankaŭ viaj faroj. Ora rando de folioj admonu vin, ke faroj enskribitaj devas esti orsimilaj, kaj kiel tiun libron ĉirkaŭprenas ruĝaj kovriloj, la signo de amo, tiel same ĉirkaŭprenu la amo ĉiun vian agon!« — »Mi promesas, reĝo, plenumi ĉion, kion vi bonvolas ordoni, kaj la amo, per kiu brulas mia juneca koro, estu apanaĝo de tiuj, kiuj estos petontaj min pri ĝi.« — »Foriru, maljuna Silvestro, por morti pro viaj pekaj faroj! Sed vi, juna posteulo, komencu regadi por feliĉo de homaro!« — Junulo kaj maljunulo forlasis la reĝan ĉambron. — —

Kiel poste multaj ĉeestintoj al mi rakontis, havis la maljuna Silvestro tre belan morton laŭ volo de la reĝo Tempo, kaj multaj homoj lin priploris. La »Novjaro« skribas diligente per ora plumo en la libron de la tutmonda amo.

oooo

## RADIUMA URBO.

Unu el la plej malnovaj minurboj de Ĉeĥoslovakio estas la fame konata urbo Jáchymov (germ. Joachimsthal), kiu kuŝas proksimume 6 km de la saksa landlimo, 700 m super mara nivelo en la suda parto de la montaro Rudohoří (germ. Erzgebirge), en okcidenta parto de Bohemujo. La komenco de la minekspluatado en la ĉirkaŭaĵo de Jáchymov datiĝas de la unua duono de la 15. jarcento. En la komenco de la 16. jarcento estis tie ĉi preskaŭ 9000 ministoj. Tiam ĝenerale oni minis tie ĉi arĝenton kaj la grafoj Šlik, al kiu apartenis la minejoj, lasis el la arĝento tie ĉi gajnita stampi »groŝojn«, t. n. »groŝoj de Jáchymov«. En la mezo de la 17. jarcento transiris pli granda parto de minejoj al la posedaĵo de la ŝtato (aŭstria).

En pli granda profundo de la minejoj fariĝis la arĝenta minaĵo malofta, sed oni trovis tie nigran kaj tre pezan minaĵon, similan al peĉo. En la jaro 1789 la ĥemiisto Klaprot trovis en tiu ĉi minaĵo elementon »uranium«. En la mezo de la 19. jarcento iu mineja ĥemiisto sukcesis gajni el tiu ĉi minaĵo belegan flavan koloron, uzeban por kolorigi vitron kaj porcelanon. En tiu ĉi industria fako ĝi estas uzata ĝis nun.

Dum longa tempo neniu supozis, ke en tiu ĉi minaĵo estas kaŝita ankoraŭ alia multe pli rara elemento, la radiumo, ĝis en la jaro 1898 la geedzoj Currie en Parizo sukcesis gajni el la minaĵo de Jáchymov ĉi tiun plej multekostan elementon de la mondo. De tiu momento datiĝas la nova periodo de la mortantaj minejoj de Jáchymov. En la unuaj jaroj de la 20. jarcento ĉesis tie ĉi la minado de arĝento kaj la tuta zorgemo sin turnis al la ekspluatado de »peĉminaĵo«, de uranfardo kaj de radiumpreparaĵoj. Nuntempe oni fosas

oooo

en du ŝaktoj. Du famaj ŝaktoj estis subakvigigitaj kaj nun ili donas tre varman kaj multvaloran radioaktivan fonton, kiu servas al la mondkonata banejo de Jáchymov. La ŝaktoj estas profundaj proksimume 500 m. Ili estas posedaĵo de Ĉeĥoslovaka ŝtato, kiu havas monopolon por radiumproduktado.

La akirita minajo estas purigata kaj poste disfrotata. Tiel preparita minajo estas likvigata en sulfuracido. En la solvaĵon transiras la urano, dume en la ne likvigebla parto restas la radiumo. El la solvaĵo oni gajnas en farbofabriko la uranfarbojn en ok diversaj koloroj, flavaj kaj oranĝaj. El la nelikvigebla parto oni gajnas en radiumfabriko radiumon per komplikita ĥemia procedo. La fina rezultato estas radiumchlorido. El 10.000 kilogramoj da uranminajo oni gajnas unu gramon da radiumo. La radiumpreparaĵojn oni metas en malgrandajn botelojn kaj poste — en la ŝtata Radiologia instituto — enplombas ilin en aliajn botelojn.

Antaŭ la milito oni gajnis en Jáchymov jare 2 gramojn da radiumo; nun la produkto estas iom pli malgranda, sed tamen ĝi kreskas ĉiujare kaj kreskos ankoraŭ pli, kiam la malnovaj aranĝoj de la ŝaktoj estos modernizitaj. Nuntempe la ŝtata administrejo de la ŝaktoj donas al la minejoj de Jáchymov plej zorgeman atenton kaj provizas ilin per modernaj maŝinoj. Tial oni esperas, ke la produkto de radiumo baldaŭ duobliĝos.

Nuntempe laboras en la ŝaktoj 300 laboristoj, en la fabriko de uranfarboj kaj radiumo 25 laboristoj.

oooo

Jan van Schoor, Antwerpen:

### AMELI'.

Ne estas knabineto  
kun pala la vizaĝ',  
sed knabineto sana  
el paca la vilaĝ':  
ŝi estas kvazaŭ foro,  
floranta gerani':  
la karulino mia,  
la bela Ameli'.

Ni promenadas ambaŭ  
dimanĉe post la mes';  
mi iras kun ŝi danci  
je gaja la kirmes'.  
Kaj la aliaj knaboj  
rigardas kun envi',  
amaton la feliĉan  
de l' ĉarma Ameli'.

Kaj la proksiman jaron  
je la grandfesta fin',  
la vilaĝpastro igos  
nin edzo kaj edzin'.  
En farmo la malgranda  
feliĉe vivos ni:  
infanojn al mi multajn  
donacos Ameli'!

### GAJA HORO DE MATEMATIKO.

Lastan posttagmezon antaŭ finiĝo de la lernejarlo estas lernantoj ĉiam bonhumoraj. Ĝi ne estas pro la tutjara, farita laboro, sed pro la ferioj, tempo de libereco, ĝojo kaj agrabla senzorgeco. Tiaj estis ankaŭ lernantoj de dua klaso de la burĝa-lernejo dum lasta instruado de aritmetiko. Ili nur ŝercis, ridis kaj estis malpaciencaj; eĉ la kajerojn ili jam ne kunprenis kaj estis tiom kolegece sindonemaj, ke ili sin ne ĝenis instigi la instruiston ne plu lerni, sed nur rakonti.

»Kia ideo, knabetoj miaj, io simila ne povas kaj ne devas esti! Kontraŭe, mi devas konvinkiĝi pri via sperteco en la matematiko, kiun vi jam lernas 6 jarojn kaj kiun vi bezonas dum la tuta vivo kiel fiŝo akvon. Atentu, ni kalkulu parkere: „Kiom estas  $\frac{1}{2}9 - \frac{1}{2}5 + 4\frac{1}{2}$ ?«

Silento por momento, poste fluŝtrado, kiun interrompis unu kalkulanto:

»Mi petas, s-o instruisto, diru ĝin ankoraŭ foje!«

Tio fariĝis kaj tuj leviĝis brakoj kiel karpetoj el trankvila nivelo de fiŝlageto.

La anoncataj rezultoj: 10,  $9\frac{1}{2}$ , 9, 8, estis sekvataj per ekkrioj de malkonsento, ĝis fine »bone« bonvenigis ree  $\frac{1}{2}9$ .

»Kiamaniere vi ĝin kalkulis?«

» $\frac{1}{2}9 - \frac{1}{2}5 = 4$  kaj  $4\frac{1}{2} = 8\frac{1}{2}$  aŭ  $\frac{1}{2}9$ .«

»Mi petas, mi ĝin kalkulis alimaniere:  $\frac{1}{2}5$  estas same kiel  $4\frac{1}{2}$ , pro tio  $\frac{1}{2}9$  ne ŝanĝas.«

»Vi kalkulis plej sprite.«

Tio plaĉis al la knaboj kaj ili petegis ankoraŭ similan ekzercon, promesante grandan atentemon.

»Bone!« diris la instruisto, »sed plenumu, kion vi promesis.«

»Antaŭ la milito venis en ŝuistan magazenen vojaĝanto kaj aĉetis ŝuojn por 12 Kĉ, pagante per 20 Kĉ banknoto. La majstro ne posedis monerojn kaj ŝanĝis la banknoton ĉe sia najbaro fumaĵisto. Sed post momento alkuris la fumaĵisto, ke la 20 Kĉ banknoto estas falsa kaj postulis alian 20 Kĉ. La majstro estis devigata ĝin kompensi. Elkalkulu, kiom perdis la ŝuisto?«

»Ha! ĉi tio estas pli komplikita«, malpli-pezigis sian koron unu knabo. Do la instruisto ripetis la ekzemplon.

»Mi jam scias!« ekkriis unu rapida kalkulanto: »Li perdis la botojn kaj 8 Kĉ ĉe la vojaĝanto kaj ĉe la fumaĵisto 20 Kĉ.«

»Vi ne estas prava«, eksaltis alia lernanto, »ĉe la vojaĝanto li perdis botojn kaj 8 Kĉ, kaj ĉe la fumaĵisto ankaŭ nur 8 Kĉ, ĉar 12 Kĉ li ricevis de la vojaĝanto.«

»Mi pensas, tio ankaŭ ne povas esti. La botojn li ne perdis, ricevinte je ili 12 Kĉ. Li perdis ĉe la vojaĝanto 8 Kĉ kaj ĉe la fumaĵisto 20 Kĉ.«

«Tio ne estus ĝuste», diris kelkaj dubantoj. «La ŝuisto posedis nun nek botojn nek 8 Kĉ kaj al la fumajŝto donis krom 12 Kĉ por la botoj ankoraŭ 8 Kĉ, sume 40 Kĉ.»

«Ankaŭ tio ne estas ĝusta!» ekkriis alia knabo. «Laŭ tio li estus ricevinta nenion je la botoj kaj li posedis 12 Kĉ je ili.»

«Jes,» defendis alia, «sed nun li posedis nek botojn, nek 12 Kĉ, ĉar li donis al la fumajŝto originalan 20 Kĉ banknoton.»

«Do li perdis la botojn kaj ankaŭ 20 Kĉ.» Sed eĉ al tiu ĉi matematikisto la kalkulo ne sukcesis. Ili jam ĉesis esperi la ekzemplon ĝuste elkalkuli. De tempo al tempo ĉiuj ridegis, de tempo al tempo ili serioze kalkulis, konsiliĝis, kaj dum tiu konfuzo eksonoris sonorilo.

«Ni tre petas, s-o instruisto, diru al ni kiom perdis la ŝuisto?»

«Ne, mi ne diros; sed vi havos ĉi tiun kalkuladon kiel leciono por libertempo.»

Dum la paŭzo atendis la instruiston 2 lernantoj, por sciigi lin, ke ili tion jam elkalkulis.

«Do, flustru ĝin!»

Efektive, ili kalkulis ĝuste.

Kiu el la legantoj volus ankaŭ flustri, kiom perdis la ŝuisto, li povas tion fari skribe al mi pere de la redakcio de «La Progreso».

Esp. A. Žaludová.

ooo

## DE LA INTERNACIA LABORA OFICEJO.

Batalado kontraŭ senlaboreco.  
La Internacia Asocio.

La aga komitato de la Internacia Asocio por la batalado kontraŭ senlaboreco, kiu lastatempe rekomencis sian agadon, informis la naciajn filiojn kaj la korespondantojn de la Asocio en Eŭropo kaj Usono pri ĝia intenco partopreni en la Internacia kongreso pri sociala politiko kunvenonta en la jaro 1923. Ĝi proponas postuli, ke la problemoj pri senlaboreco estu enskribita en la tagordo de la kongreso.

La Komitato petas la naciajn filiojn fari propagandon en iliaj respektivaj landoj, por ke la registaroj konfirmu la projekton de konvencio pri senlaboreco, balotitan de la Internacia Labora Konferenco en Washington (1919) kaj la projekton de konvencio por faciligi la dungon de maristoj, balotitan de la konferenco en Genova (1920). Ĝi ankaŭ insistas pri la efektivigo de la diversaj rekomendoj de la Internaciaj Laboraj Konferencoj rilataj al senlaboreco.

Fine la Komitato petas la naciajn filiojn helpi la Internacian Laboroficejon al ĉiu enketo pri senlaboreco kaj al ĝia laboro pri elmigrado.

La belga filio jam klopodis pri tio, enskribinte en sia programo de tuja laboro, studadi la demandojn pri sezona senlaboreco, orientado profesia kaj elmigrado.

ooo

## KULTURO

**Memorindaj datoj en januaro:** La 1. j. 1898 estis fondita Societo por propagando de Esperanto en Francujo. — La 2. j. 1905 estis Port Artur venkoakirita de Japanoj. — La 3. j. 1849 nask. Ernest Denis, franca historiisto, la fama amiko de ĉeĥoslovakoj. — La 4. j. 1921 mortis Ernest Denis en Parizo. — La 5. j. 1643 nask. Sir Isaac Newton, angla astronomo. — La 6. j. 1916 mortis per akcidento Harold Boligbroke Mudie, la unua prezidento de U. E. A. — La 8. j. 1642 mortis Galileo Galilei, la itala astronomo. — La 10. j. 1356 la ĉeĥa reĝo Karolo IV. publikigis sian »oran bultenon«. — La 12. j. 1746 nask. J. Pestalozzi, svisa edukisto. — La 13. j. 1755 estis fondita la universitato de Moskva. — La 15. j. 1622 nask. J. B. Molière, la franca dramverkisto. — La 16. j. 1756 komenciĝis la »sejara milito« inter Aŭstrio kaj Prusio. — La 17. j. 1706 nask. Benj. Franklin. — La 18. j. 1409 la ĉeĥa reĝo Václav IV. publikigis sian »dekret kutnohorský« (dekreto de Gutenberg). Foriro de germanaj studentoj kaj profesoroj el la universitato de Praha. — La 19. j. 1736 nask. James Watt, la eltrovinto de vapormaŝino. — La 20. j. 1265 estis kunvokita unua popola parlamento (en Anglujo). — La 21. j. 1862 mortis Božena Němcová, la ĉeĥa verkistino. — La 23. j. 1793 okazis la dua divido de Polujo (inter Rusujo kaj Prusio). — La 26. j. 1823 nask. Ed. Jenner, la eltrovinto de vakciniado. — La 27. j. 1756 nask. W. A. Mozart, germana komponisto. — La 26. j. 1725 nask. la rusa reformema imperiestro Petro la Granda. — La 30. j. 1648 estis senkapigita Karolo I., la angla reĝo. — La 31. j. 1865 estis nuligita sklaveco en U. S. A.

**Memorindaj datoj en februaro:** La 1. f. 1905 estis fondita Hispana societo por propagando de Esp. — En j. 1908 estis mortigita la portugala reĝo Carlos de konspirantoj. — La 2. f. 1829 nask. W. Brehm, aŭtoro de la verko »Vivo de bestoj«. — La 4. f. 1808 nask. J. K. Tyl, ĉeĥa aktoro kaj dramverkisto. — La 5. f. 1820 nask. Božena Němcová, la ĉeĥa verkistino. — La 7. f. 1812 nask. Ch. Dickens, angla verkisto. — La 8. f. 1828 nask. J. Verne, franca verkisto. — La 9. f. 1881 mort. F. M. Dostojevskij, rusa verkisto. — En 1923 mortis Adolf Heyduk, ĉeĥa poeto. — La 10. f. 1837 mortis en duelo A. Puŝkin, rusa poeto. — La 11. f. 1847 nask. Tom. A. Edison. — La 12. f. 1809 nask. K. Darwin, angla natursciencisto. — La 13. f. 1883 mortis R. Wagner, germ. komponisto. — La 15. j. 1818 nask. J. P. Jordan, vekanto de Luzaciaj serboj. — La 16. f. 1853 nask. J. Vrchlický, ĉeĥa poeto. — La 17. f. 1600 estis bruligita filozofo Giordano Bruno kiel herezulo. — La 18. f. 1546 mortis Martin Luther, germ. eklezia reformisto. — La 19. f. 1743 nask. M. Koperník, fama astronomo. — La 21. f. 1846 nask. Svat. Čeh, ĉeĥa poeto. — La 22. f. 1732 nask. G. Washington, fond. de amerika sendependeco. — La 23. f. 1908 mortis Svat. Čeh. — La 24. f. 1468 mortis J. Gutenberg, eltrovinto de libropresado. — La 26. j. 1802 nask. V. Hugo, franca verkisto. — La 28. f. 1882 estis dividita la universitato de Praha en du partojn: ĉeĥan kaj germanan.

### »Malsanoj« de multekostaj ŝtonoj.

Unu el multaj mirindaj ecoj de l' radiumo estas, ke ĝi plibonigas gemojn ŝanĝante malpli valorajn en valorajn. Jam en jaro 1907 estis fama franca scien-

encisto Becquerel surprizita per fakto, ke vitra tubeto enhavanta radiumon brilis belege azure. Li tiam pensis, ke radiumo revivigis restaĵojn de mangano, kiuj eble en la tubeto restis. La afero estis tiel interesa, ke li komencis studi la efikojn de radiumo je korundo. Natura korundo estas mineralo tre malmola, senkolora, aŭ dubegriza, blueta, bruneta kaj viola. Ĝi enhavas 53.04% da aluminio kaj estas malfacile rompebla. Gemoj: ruĝa rubeno, blua safiro, flava topaso estas specoj de korundo, multvaloraj. Korundo mem, t. e. ĝia malklara speco havas nur komercan valoron. Ĝi estas nomata smirgo, kaj oni uzas ĝin en diversaj industriaj fakoj. Profesoro Bordas metis kelkajn malpli valorajn kristalojn al la tubeto, en kiu estis radiumo kaj lasis ilin tiel unu monaton. Poste li vidis, ke la kristaloj de korundo ne havis plu sian malklaran koloron. Senkoloraj fariĝis flavaj kiel topaso, blujaj brilis verda same kiel smaragdoj. Viola koloro de aliaj kristaloj fariĝis safire blua. Preskaŭ senvaloraj kristaloj ŝanĝis tute sian ĥemian karakteron kaj tiel la saman procedon, kiu daŭras en la naturo miljarojn, faris la scienco preskaŭ antaŭ niaj okuloj. Multaj virinoj portantaj perlojn scias, ke perloj »malsaniĝas«, t. e. ke ili perdas brilon kaj koloron, kiuj estas plej valoraj fenomenoj de perloj. Ankaŭ la opaloj estas nur kaŭze de tio tre malofte uzataj, ĉar ili krevas kaj elfalas el la juveloj. Ĉiuj gemoj, krom diamanto, precipe en la sunlumo perdas sian koloron. La grenato fariĝis flava, brazila topaso havas poste ruĝetan nuancon. Ankaŭ la varmo difektas rubenon kaj safiron, kiuj perdante sian karakteran brilon perdas ankaŭ la prezon. Ĉiuj difektoj de ĉi tiu speco »kuracas« radiumo, kaj ankaŭ la perloj akceptas sian antaŭan koloron kaj brilon, se oni metos ilin en marakvon. Ĉar ĉi tiu akvo enhavas ankaŭ radiumon, plejparte kiel emanajon, la ĥemiistoj opinias, ke la ŝanĝoj supre diritaj estas kaŭzigitaj per ĝi. Orientaj juvelistoj konas multajn perskribojn kontraŭ la malsanoj de gemoj. Sed mi vane klopodis ekkoni iajn. Ili konservas ĉiujn, ankaŭ el scienca vidpunkto interesajn, kiel sekreton. Sed la »kuracado« ne estas longdaŭra. Post kelkaj monatoj aperas la difekto denove.

M. U. C. Riedl.

## ĈEĤOSLOVAKIO.

**La komunista partio** de Ĉeĥoslovakujo aranĝis komence de februaro en Praha sian kongreson. Laŭ la prezentita raporto ĝi havas proksimume 132 miloj da partianoj (antaŭ unu jaro ĝi havis 206 miloj da ĉeĥaj, 42 miloj da germ., 5 miloj da polaj kaj 1000 hebreaj membroj). Dum la lasta jaro ĝi perdis pli ol 122 miloj da membroj.

**Gazeton por malliberuloj** komencis eldonadi la ministerio de justeco. Ĝia titolo estas »Noviny«. La gazeto havas la ceon helpi al morala eduko de malliberuloj kaj tial ĝi enhavas konformajn artikolojn kaj raportojn.

**Verdikto de morto.** Kaŭze de kreskanta krimeco kaj oftaj mortigoj la ministerio de justeco decidis en speciale gravaj okazoj plenumi verdikton de morto, por tiel fortimigi la krimemajn individuojn. Tial okazis en la nuna jaro jam du mortekzekutoj (en Tábor kaj en Praha).

**Stampado de dekheleraĵ moneroj.** »Prager Presse« anoncis, ke la novaj dekheleraĵ moneroj estas stampataj kaj post 6—8 semajnoj ili komencos cirkuli por anstataŭi la ĝis nun uzatajn aŭstriaĵn

dekhelerojn. Post dekheleroj oni stampos kvin-kaj duhelerojn, per kio la enlanda monarango estos kompleta. La paperaj kronbiletaj baldaŭ malaperos, ĉar baldaŭ oni havos sufiĉan kvanton da metalaj kronmoneroj. Nuntempe cirkulas 60 milionoj da paperaj kronbiletaj.

**La VII. Internacia kongreso de skiistoj** kun partopreno de Finnlando, Svedujo, Germanujo, ĈSR., Jugoslavio, Aŭstrio, Rumanujo kaj Anglujo okazas de 4—16 februaro en Ĉeĥoslovakujo. De la 7. ĝis 11. februaro okazis en montaro Krkonoŝe XXVIII. internacia skiista konkurso. De la 12—16 feb. la kongresintoj vizitis Tatra-montaron en Slovakujo. Ni enpresas bildojn el la lokoj, kie okazis la konkursoj.

ooo

## LEGOLIBRO.

### La terpomoj.

De Schubert.

La terpomoj estis transportitaj el Ameriko Eŭropon unue antaŭ kelke da jarcentoj. La marveturisto Francisko Drake sendis iom da ili al sia amiko por plantado kaj skribis: »La frukto de tiu ĉi kreskaĵo estas tiel bongusta kaj nutra, ke mi opinias ĝian kulturadon tre utila por Eŭropo«. La amiko de Drake pensis, ke la »frukto« estas la verdaj tuberoj, kiuj pendas sur la kreskaĵo. Kiam venis la aŭtuno kaj la tuberoj jam estis flavaj, li invitis multe da eminentaj gastoj al luksa festeno. Je la fino oni alportis kovritan pladon, kaj la mastro leviĝis kaj diris belan paroladon: »Nun mi havas la honoron, prezenti al vi frukton, kies semon mi ricevis de mia amiko, nia fama Drake, kun certigo, ke ĝia kulturado estos tre utila por Anglujo«. La invitatitaj parlamentanoj gustumis la frukton, rostitan en butero kaj surŝtitan per sukero kaj cinamo, sed ĝi estis abomena. Ĉiuj esprimis la opinion, ke la frukto eble estas bona por Ameriko, sed en Anglujo ĝi ne maturiĝas. La mastro ordonis post kelke da tagoj elŝiri kaj forĵeti la kreskaĵojn.

Sed foje matene, promenante en la ĝardeno, li rimarkis nigrajn, rondajn tuberojn en la cindro de la fajro, kiun ekbruligis por si la ĝardenisto. Li dispremis unu per la piedo: ĝi havis agrablan odoron, tio estis bakita terpomo. Li demandis la ĝardeniston, kio ĝi estas. La ĝardenisto diris al li, ke li trovis la tuberojn ĉe la radikoj de la amerika kreskaĵo. La amiko de Drake komprenis nun ĉion. Li ordonis kolekti kaj kuiru la subterajn tuberojn kaj invitis la parlamentanojn. Kredeble li diris, ke kiam oni juĝas supraĵe, oni ofte faras grandajn erarojn.

Trad. Kabe.

### Tri iratoj.

El »Elektitaj fabeloj« de Fratoj Grimm.

Estis iam homo, kiu havis tri filojn. Krom domo, en kiu li loĝis, li posedis monon. Ĉiu el la filoj deziris heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn egale, kaj li ne sciis, kion fari, por ne esti maljusta; plej simple estus, vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis la hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj: »Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj lernu ĉiu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon.« La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbiro, la tria skermisto. Ili destinis la tagon de la reveno kaj foriris. Fe-


liĉe ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion. La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de la reĝo kaj pensis: »Farita estas la afero, la domo estas via.« La barbiro razis nur altrangulojn kaj pensis la samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagrenis, ĉar li pensis: »Se vi timas batojn, vi neniam ricevos la domon.« Kiam pasis la destinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis, kiamaniere trovi la plej bonan okazon por montri sian arton, ili sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon trakurantan la kampon. »Jen ĝi venas kvazaŭ invitive« — diris la barbiro, prenis siajn pladeton kaj sapon, ŝaŭmigis ĝin, ĝis kiam la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado sapumis ĝin kaj razis ĝian barbon: li ne vundetis ĝin — nek

diablo kaj diris: »Hodiaŭ mi regalos vin. Ne timu! kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili estis tiel lertaj kaj tiel amis unu la alian, oni metis en unu tombon.  
Trad. Dro Kabe.

### Karagara.

#### Hinda legendo.

En la urbo Vataman vivis saĝa, sed malriĉa bramano Kecava. Lia edzino Karagara estis malbona al ĉiu; eĉ la diablo, kiu loĝis en arbo apud tiu domo, el timo je Karagara forkuris en dezerton. La bramano ne povis elteni la turmentojn, ricevitajn de sia edzino, kaj forkuris. En la vojo vidis lin la



### TATRAMONTARO: „ŠTRBSKÉ PLESO“.

kaŭzis doloron. »Tio plaĉas al mi — diris la patro — se viaj fratoj ne estos pli lertaj, lo domo estos via.« Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo. »Nun vi vidos, patro, kion mi scipovas« — diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufiferojn kaj alnajlis kvar novajn. »Brave, — diris la patro — vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devos doni la domon.« La tria diris: »Permesu ankaŭ al mi montri mian arton.« Ekpluvis, la skermisto eltiris la spadon kaj eksvingis ĝin super la kapo: neniu guto falis sur lin. La pluvo pli-grandiĝis, kaj fine la akvo fluus kvazaŭ el kuvo: la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis tute seka kvazaŭ sub tegmento. Ek-miregis la patro vidante tion kaj diris: »Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via.«

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo, kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis feliĉe ĝis maljunula aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ili ankaŭ malsaniĝis

Mi loĝis en arbo apud via domo, sed el timo je Karagara mi forkuris; mi volas fari al vi ion bonan. Iru en la urbon Mrigavati; tie regas Madana; mi eniros en lian filinon Mrigaloĉana'n kaj lasos min elirigi nur per vi.«

Tiel estis farata. La diablo eniris en la reĝidonon, la bramano venis kaj faris ĉion, kion faris la aliaj magiistoj, sed la diablo ne eliris. Fine la bramano diris: En la nomo de la Karagara, »eliru!«, kaj la diablo obeis.

La reĝo donis al la bramano sian filinon kiel edzinon kaj kun tio ĉi ankaŭ duonon de la regno. — La diablo iris en la urbon Karnavati kaj eniris en la reĝinon Suloĉana'n. La reĝo sendis al Madana kaj petis pri la magiisto Kecava. Tiu ĉi venis al la turmentata reĝino, sed la diablo vidinte lin, diris: »Jam unu fojon mi helpis al vi, nun gardu vin.« La bramano alpaŝis pli proksime kaj ekurmuretis al la reĝino en la orelon: »Karagara venis, mi volis nur diri tion al vi.« La diablo, aŭdinte tion ĉi, ektimis kaj eliris. La bramano, ricevinte grandajn honorojn de la reĝo, reiris en la urbon Mrigavati.



**Janko-muzikanto.**

Noveleto de H. Sienkiewicz.

Gi venis sur la mondon malfirma kaj malforta. La baptingoj, kiuj sin estis kolektintaj apud la lito de la naskinto balancadis la kapojn super la patrino kaj super la infano. La forĝiestedzino Simonova, kiu estis la plej saĝa, komencis konsoladi la malsanan:

»Donu — ŝi diras — mi ekbruligos super vi la kandelon de morto; ĉar el vi jam nenio estos, mia amikino; vi jam devas pretiĝadi por la alia mondo kaj venigi la pastron — bonfariston, por ke li al vi pardonu viajn pekojn. — Ba — diras dua — kaj la knabon oni tuj devas bapti; li eĉ ne alatendos la bonfariston, kaj, ŝi diras, bone estos, ke li almenaŭ ne mortu sen baptito.«

Tiel parolante, ŝi ekbruligis grandan vaksan kandelon, kaj poste, preninte la infanon, super-

kaj ploretadis mallaŭte pro malvarmo kaj iafaje pro malsato, kiam la patrino nenion havis por meti nek en la fornon nek en la poton; en la somero li iradis en ĉemizeto ĉirkaŭligita per randeto de ŝtofo kaj en la pajla ĉapelo, sub kies ĉifonita tegmento li elrigardis, levante kiel birdo la kapon. La patrino, malriĉa vilaĝanino, vivanta tagon post tago kiel hirundo sub malpropra pajla tegmento, eble lin amis siamaniere, sed ŝi batadis lin sufiĉe ofte kaj nomis lin »sentaŭgulo«. En la oka jaro li iradis jam kiel garda knabo post la bruto, aŭ, se en la domo nenio estis por manĝi, kolekti fungojn en la arbaro. Ke lin tie iam lupu ne manĝis, estis nur kompto de Dio.

Li estis knabo malsprita kaj kiel la vilaĝaj infanoj, ĉe la parolado kun homoj, metanta fingron en la buŝon. La homoj eĉ ne promesis al si, ke li vivos, kaj ankoraŭ malpli, ke la patrino povus iam atendi konsolon de li, ĉar ankaŭ por la laboro li estis



TATRAMONTARO: SUPER „KOPROVÉ SEDLO“.

verŝis ĝin per akvo, ke ĝi komencis fermadi la okuletojn, kaj ŝi diris ankoraŭ: »Mi vin baptas en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Spirito Sankta kaj donas al vi la nomon Jan', kaj nun animo kristana, iru, el kie vi venis, Amen!«

Sed la animo kristana ne havis tute la deziron iri, el kie ĝi venis, kaj forlasi la malfirman korpon; kontraŭe, ĝi komencis batadi per la piedetoj de tiu ĉi korpo, kiel ĝi nur povis, kaj plori, kvankam tiel malforte kaj malĝoje, ke, kiel diris la baptingoj: »Oni povus pensi: katido aŭ io alia!«

Onj sendis venigi la pastron; li alveturis, faris sian devon kaj forveturis: al la malsanulino fariĝis pli bone. Post semajno la virino eliris al la laboro. La knabeto apenaŭ »spiretadis«, sed li spiretadis, ĝis kiam en la kvara jaro en la printempo la kukolo superkukolis la malsanon, tial li pliboniĝis kaj en kontentiga sano atingis la dekan jaron de la vivo.

Malgrasa li estis ĉiam kaj bruligita de suno, kun ventro elblovia kaj enfalintaj vangoj; li havis harojn brilajn, preskaŭ blankajn, kiuj falis sur la brilajn, larĝe malfermitajn okulojn, rigardantajn la mondon, kiel se ili rigardus en nemezureblan malproksimon. En la vintro li sidadis post la forno

mallerta. Onj ne sciis, el kie li venis tia sur la mondon, sed por unu afero li estis pli avida, tio ĉi estas por la muziko. Cie li ankaŭ ĝin aŭdis, kaj kiam li nur iom elkreskis, tiam li jam pri nenio alia pensis. Li iras ekzemple en la arbaron post la bruto aŭ kun dupoto por kolekti fragojn, poste li revenas sen fragoj kaj diras:

»Patrino! en la arbaro tiel oni ludis! Oj! Oj!«

Kaj la patrino respondas:

»Mi ekludos al vi, ekludos! ne timu!«

Kaj iafaje ŝi faris al li muzikon per ligna kuler-ego. La knabo kriis, promesadis, ke li jam tion ne faros, sed tamen, li pensis, ke tie en la arbaro io ludis... Kio? ĉu li sciis? aL pinoj, fagoj betuloj, oriojoj, ĉio ludis: per unu vorto, tuta l' arbaro!...

La eĥo ankaŭ... En la kampo ludis al li la artemizio, en la ĝardeneto apud la domo pepadis la paseroj, ke la ĉerizujoj tremis! En vesperoj li aŭskultadis ĉiujn voĉojn, kiuj estas en la vilaĝo, kaj kredeble pensis al si, ke la tuta vilaĝo ludas. Kiam oni lin sendis al laboro, por ke li disĵetadu la sterkon, eĉ la vento ludis al li en la forkego.

Tiel ekvidis lin unu fojon la laborestro, starantan kun disĵetitaj haroj kaj aŭskultantan la venton en

Poštovní úřad šekový v Praze.

# Stvrzenka

na vklad Kč ..... h ..... , t. j.

korun   
 \_\_\_\_\_   
 \_\_\_\_\_   
 \_\_\_\_\_


pro šekový účet: **5.203**

u pošt. úřadu šekového v Praze.

Majitel účtu:

**Esperantista klubo en Plzeň  
Plzeň.**

Podpis pošt. úředníka:



T. č. 10.

Poštovní úřad šekový v Praze.

# Složenka


Vklad: Kč ..... h .....

pro šekový účet číslo **5.203**

jež učinil .....

dne ..... 19.....

Poštovní razítko:



T. č. 10.

**5**

Poštovní úřad šekový v Praze.

# Súčtovanka


Vklad Kč ..... h .....

pro šekový účet čís. **5.203**

jež učinil .....

Vyplní strana.

Poštovní razítko:



T. č. 10.

**5**

Vyplní strana.

Súčtovanka zůstane u poštovního úřadu šekového.  
Majitelé účtů nedovědí se tudíž o sděleních, která  
by na tomto místě byla napsána.

**Pro sdělení majitelů účtu.**  
(Dlužno však přilepiti 50h. známku.)

Složenka se ve všech třech dílech podle předtisku vyplní a s penězi odevzdá poštovnímu úřadu.

Lze ji vyplniti inkoustem, tiskem anebo psacím strojem. Jakožto podací den musí vkladatel zapsati den, kdy se vklad skutečně stane.

Úředník poštovní doplní stvrzenku, oddělí ji od složenky a vrátí ji podateli jako potvrzení, že peníze vložil. Složenka a súčtovanka se zašle poštovnímu úřadu šekovému v Praze.

Složenek, na nichž jest v předtisku nebo v obnosu peněz něco vymazáno, přeškrtnuto nebo vůbec změněno, úřady poštovní nepřijmou. Rovněž tak se odmítnou složenky nejasně vyplněné, příliš zašpiněné nebo roztrhané.

ligna forkego... ekvidis, kaj deliginte la rimenon, donis al li bonan memoraron. Sed kion tio ĉi utilis! La homoj nomis lin »Janko-muzikanto«! En printempo li forkuradis el la domo por fari fajfilojn ĉe la rivereto. En noktoj, kiam la ranoj komencis kvakadi, la ortikoj sur la herbejoj triladi, la ardeoj super la roso bruadi, kiam la kokoj kantis post la bariloj, li ne povis dormi, li nur aŭskultis, kaj Dio sola scias, kiam muzikon li ĉiam aŭdis. En la preĝejon la patrino lin ne povis preni, ĉar kiam ektondras la organo, aŭ kiam oni ekkantas per doĉa voĉo, al la infano la okuloj tiel sin kovras per nebulo, kiel se ili jam ne rigardus el tiu ĉi mondo... La nokta gardisto, kiu iradis tra la vilaĝo kaj, por ne ekdormi, kalkuladis la stelojn sur la ĉielo aŭ paroladis mallaŭte kun la hundoj, vidis ofte la blankan ĉemizeton de Janko, transkurantan en la mallumon al la vilaĝa gastejo. Sed la knabo ne iradis en la gastejon, nur apud la gastejon. Tie sidiginte ĉe la muro li aŭskultadis. La homoj dancis la »obertason« iafoje iu juna vilaĝano ekkriis: »U-ha«! Estas aŭdata la frapado de botoj aŭ la voĉoj de knabinoj: »Kio?« La violonoj kantis mallaŭte: »Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili.« kaj la violon-baso per profunda voĉo akompanadis: »Donu Di! Donu Di!« La fenestroj brulis de lumo kaj ĉiu ligna kolono en la gastejo ŝajnis tremi, kanti kaj ludi, kaj Janko aŭskultis!...

Kion li donus por tio, se li povus havi tian violonon ludantan delikate: »Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili!« Tiajn tabuletojn kantantajn! Ba! sed kie ĝin ricevi, kie oni faras ilin? Se oni almenaŭ permesus al li eĉ unu fojon preni en la manon ion similan!... Ne! Permesita estis al li nur aŭskulti, tial ankaŭ li aŭskultis kutime tiel longe, ĝis kiam la voĉo de la gardisto ekvokis post li el la mallumo:

»Ĉu vi ne iros domon, turmentulo?«

Tiam li forkuradis sur siaj nudaj piedoj hejmen, kaj post li iris en la mallumaĵo la voĉo de la violonoj: »Venis ili, ni kun ili: manĝi, trinki kaj babili!« kaj la grava voĉo de la violono-baso: »Donu Di! Donu Di!«

Se li nur povis aŭdi la violonon, ĉu dum la festo de kampaj falĉistoj, ĉu dum la festo de edziĝo, por li jam estis tre granda festotago. Li rampis poste post la fornon kaj ne parolis tutajn tagojn, elrigardante kiel kato per la brilantaj okuloj e la mallumo. Poste li faris mem al si violonon el tegmenta tabuleto kaj el ĉevalaj vostharoj, sed ĝi ne volis ludi tie! bele kiel la violono en la gastejo: Ĝi sonis mallaŭte, tre mallaŭte, tute kiel iaj muŝetoj aŭ kuloj. Li ludis tamen sur ĝi de la mateno ĝis la vespero, kvankam kiel batita pomo nematura. Sed tia jam estis lia naturo. La mizera infano malgrasigadis ĉiam pli multe, la ventron li havis sole ĉiam grandan, la haraĵon ĉiam pli multe, la densan, kaj la okulojn ĉiam pli larĝe malfermitajn, kvankam la plej ofte superverŝitajn de larmoj, sed liaj vangoj kaj la brusto enfaladis al li ĉiam pli profunde, pli profunde...

Li tute ne estis kiel aliaj infanoj, li estis kiel lia violono el tegmenta tabuleto, kiu apenaŭ sonetadis. En la tempo antaŭ la kolektado el la kampo li preskaŭ mortadis pro malsato, ĉar li vivis plej ofte per karoto nekuirita kaj ankaŭ per le deziro posedi violonon.

Sed tiu ĉi deziro alportis al li nenion bonan.

En la palaco violonon havis la lakeo kaj ludis iam sur ĝi en griza horo vespera, por plaĉi al la

ĉambristino. Janko iafoje subrampadis inter la grandfoliaj bardanoj, ĝis la malfermita pordo de l' antaŭĉambro, por povi bone ĝin rigardadi. Ĝi estis pendanta sur la muro kontraŭ la pordo, tial la knabo elsendadis al ĝi tutan sian animon tra la okuloj, ĉar ŝajnis al li, ke tio ĉi estas la sanktaĵo neatingebla por li, kiun tuŝi li estis ne inda, ke ĝi estas la plej kara lia amado. Kaj tamen li ĝin deziris. Li volus almenaŭ unu fojon havi ĝin en la mano, almenaŭ rigardi ĝin pli proksime... La mal-feliĉa malgranda vilaĝano koro tremis de feliĉo ĉe tiu ĉi penso.

En certa nokto neniu estis en la antaŭĉambro. La gesinjoroj delonge estis en alilando, la domo staris malplena, tial la lakeo sidis sur la dua flanko ĉe la ĉambristino. Janko, kaŝita en la bardanoj, rigardis jam longe tra la malfermita larĝa pordo la celon de ĉiuj siaj deziroj. La lumo sur la ĉielo estis tiam plena kaj levigadis malrekte en la antaŭĉambro tra la fenestro rebatante ĝin en formo de granad lumo kvadrato sur la kontraŭkuŝanta muro. Sed tiu ĉi kvadrato proksimiĝadis malrapide al la violono, fine tute ĝin superlumis. Tiam en la malluma profundajo ŝajnis, kiel se de la violono radius lumo argenta, precipe la fleksaĵo estis lumigata tiel forte, ke Janko apenaŭ povis rigardi ĝin. En tiu ĉi brilo ĉio estis bonege videbla: la enranĉitaj flankoj, la kordoj kaj la fleksita maneto. La tiriloj de kordoj ĉe ĝi lumis kiel vermetoj de la sankta Johano, kaj longen pendis la arĉo en formo de stango argenta... Ah! ĉio ĉi estis belega kaj preskaŭ magia; Janko ankaŭ rigardadis ĉiam pli avide. Sidante en la bardanoj, kun la brakoj apogitaj sur la malgrasaj genuoj, kun buŝo malfermita li rigardadis. eĜi timo lin retenadis sur la loko, jen ia nevenkebla deziro puŝadis antaŭen. Ĉu tio estis magiaĵo, aŭ io alia?...  
(Daŭrigo.)

## DIVERSAĴOJ

**Atentu!** La venonta numero de »La Progreso« enhavos 12 paĝojn!

**Nia konkurso por anekdotoj,** kiun ni anoncis en nov. numero de nia lasta jarkolekto, estas prokrastata ĝis komenco de aprilo de t. j., ĉar ĝis nun ni ricevis nur nemultajn anekdotojn. La tegantojn ni atentigas, ke la konkurson povas partopreni eĉ komencantoj, ĉar la stilon kaj erarojn ni korektos.

**Esperanto-societojn de ĈSR,** ni petas sendi al ni raportojn pri sia agado antaŭ la 10. de ĉiu monato, por ke ni povu ilin publikigi en la kuranta monato. Raportojn malnovajn ni ne enpresos.

**Al kelkaj demandintoj:** La raportojn pri la kongreso en Nürnberg ni ne enpresas, ĉar la Kongresa komitato al ni ilin ne sendas.

**Kiu povas atentigi min** pri libroj, eldonitaj en div. naciaj lingvoj pri Siberio, bonvolu skribi al: Prof. F. J. Havelka, Praha III/38.

**Esperanto en la servo de la interpaĉigo de la popoloj.** En Praha formiĝis antaŭ kelka tempo »Amikaro de interpaĉigo« (Mezinárodní družina »Smír«), kiu celadas alproksimiĝi la naciojn, rasojn, konfesiojn kaj klasojn. Kompreneble apartenas al ĝi unuavice Esperantistoj en Praha. Sabate, la 9an de decembro 1922 nia »Amikaro« provis la unuan fojon aranĝi »interpaĉigan vesperon« por propa-

gandi nian ideon en pli vastaj rondoj. Tiu-ĉi vespero komenciĝis per salutparolado en esperanto, ĉefa kaj germana lingvoj kaj poste sekvis tute internacia arta programo kun muzikaj, kantaj kaj deklamaj prezentaĵoj el la artotrezoro de 6 nacioj resp. lingvoj. El Esperanto la bela Zamenhofa poemo »La preĝo« estis deklamata. Krom tio paroladis anoj de 9 nacioj (Ĉeĥoj, Germanoj, Judoj, Amerikanoj, Holandanoj, Ukrainoj, Bulgaroj, Rusoj kaj Francoj) en la spirito de interpaciĝo kaj trovis vivan konsenton ĉe la ĉeestantaro. La vespero estis multenombro vizitita de pli ol 800 personoj de ĉiuj nacioj vivantaj en Praha, kvankam oni ne varbadis per afiŝoj aŭ gazetoj. La bona sukceso de tiu-ĉi aranĝo montris, ke vastaj rondoj sopiras je interkompreniĝo kaj ke multaj estas pretaj publike labori por ĝi. Pluaj informoj pri tiu-ĉi movado ĉe H. Tutsch, Praha II., Ječná 1.

**La industria komitato** de la centra ligo de ĉs. komercaj kaj industr. ĉambroj en sia kunveno la 10. febr. t. j. aprobis la postulon de la Komerca ĉambro en Budějovice rekomendi la instruadon de Esp. en la komercaj lernejoj de ĈSR.

**Ĉs. komerministerio** sendis la 19. I. 1923 n-o 5915 al Esperantista Klubo en Praha je ĝia rezolucio, akceptita la 10. XII. 1922 okaze de la ĝenerala festkunveno, la jenan respondon: »Je Via rezolucio, akceptita la 10. XII. 1922 sciigas al Vi la komerministerio, ke ĝi — rekonante Esperanton kiel unu el la propagandiloj de la ĉs. turisma movado — dediĉas al ĝi sian zorgeman atenton.«

**Anstataŭ danco — ekonomiajn prelejojn!** Okazis komence de la jaro 1923 en la vilaĝo Bilovice apud Prostějov. Moravio, ke la loĝantaro decidis aranĝi anstataŭ karnavaĵaj dancoj ekonomiajn prelejojn. Ĝi estas certe okazintaĵo memorinda kaj signifoplena, montranta gravan ŝanĝon en la ideoj de la popolamasoj. Kvankam oni ne povas postuli, ke la popolo formetu siajn amuzkutimojn, kaj kvankam estas neeble tuj elradikigi ion, kio dum longaj jarcentoj elkreskadis, kaj fine oni eĉ sentas bezonon per amuzado forgesigi la turmentojn kaj monotonecon de la ĉiutaga vivo, tamen oni povas nur bonvenigi tiun-ĉi ekinteresiĝon de la larĝaj popoloj pri ekonomiaj demandoj. Vivu sekvantoj! — (Laŭ »České slovo«.) — Voĉo.

**Ĉiuj foiroj eŭropaj**, havintaj sian delegiton en la II. interfoira esp. konferenco en Helsinko, sendis en januaro 1923 al la Monda poŝtunuigo en Bern esperantan petskribon pri rabatigo por le eksterlandaj prifoiraj propagandiloj. (La foiro de Praha sendis ĝin la 18. jan., tiu de Liberec [Reichenberg] la 2. jan. t. j.)

**XIIIa orientbohema laborkunsido esperantista en Jiĉín.** Laŭ decido de XIIIa laborkunsido okazos la XIIIa en Jiĉín la 4an de marto. La 3an de marto oni aranĝos vesperon kun dancado en hotelo »Paříž«. Kongreskotizo 5 Kč. Aliĝu grandnombre. Ĉion adresu al s-ano E. Vágner, Jiĉín. Programon ni sendas kune kun transpagilo laŭ mendo! — Bobe, por festeta komitato.

**La aŭtuna termino por ŝtataj ekzamenoj** en Praha estis destinita je la 30. de novembro 1922. Venis tri kandidatoj: Fraŭlino M. Moudrá, instruistino e. Praha, s-o Alois Štěpán, lernejestro el Domašín apud Vlašim, kaj s-o Ladislav Riedl, medicinisto el Praha. Ĉiuj tri faris la ekzamenon kun tre bona sukceso.

**Kroniko.** Praha: Estis tie ĉi fondita sekcio de CAE., kiu zorgos pri tradukoj kaj publikigo de

verkoj de famaj ĉeĥoslovakaj aŭtoroj. — La »Rondeto de esperantistinoj« aranĝis la 11. j. porinfanan esp. amuzon por lernantinoj de III. klaso de civitana lernejo. — En Beroun estis fondita Esperantista klubo. Ĝia konstituanta kunveno okazis la 18. de jan. t. j. kaj jen estis elektitaj: D-ro V. Drtina, prezid., J. Jelínek, sekret., instr. J. Růžicka, kas., V. Zitek, bibliotekisto. Kunvenoj okazas ĉiujauĝde je la 19. horo en gastejo Pech, Jungmannova tř. Esp. estas instruata nedevige en la reala gimnazio (46 lern.) kaj en la komerca akademio (39 lern.). Vespera kurso por skoltaj »Psohlavci« okazas merkrede en la pop. lernejo. — Plzeň: La Popola Universitato de Hus anoncis komencon de novaj kursoj de Esp. por komencantoj kaj por progresintoj.

**Zamenhofan vespereton** aranĝis Jiĉín'a rondeto »Comenius«. La 17an de decembro vespere ni geesperantistoj aranĝis intiman solenon okaze de naskiĝfesto de nia kara Majstro. Oni ne imagu grandiozaĵojn, ni havis nur tre modestan festprogrameton, sed malgraŭ tio, vera, sincera, sankta entuziasmo regis nin ĉiujn kaj estis al ni ĉiuj profunda korbezono, ankaŭ festi nian genian Majstron. Belega festeto komencis per parolado de s-ano Mareš, poste oni ludis, kantis, deklamis. Permesu al mi ĉi tie esprimi koran dankon al s-o Soltkyevič, f-ino Grossová kaj s-o Hásek, kiuj prizorgis al ni vere solenan vespereton. Partoprenantoj de XIIIa laborkunsido orientbohema estu certaj, ke ili ĉe ni ankaŭ sufiĉe bone amuzos. — Bobe.

**»Comenius«, Jiĉín'a rondeto esperantista** elektis novan estraron: Prezidantino s-ino E. Najmanová, sekretario s-o Šikl (dum lia foresto anstataŭos Emil Vágner), kasisto Točjo Vágner, kiel protokolistino funkcios f-ino Grossová. Ni esprimas koran bondeziron kaj precipe sinceran gratulon al nia kara »Patrinjo«. Ŝi estu certigita per nia amo. — (Bobe.)

**Internacia Asocio de la Esperantistoj-Fervojistoj.** Mistifikitaj preskaŭ dum kvin monatoj de la ĝisnuna posedanto de Fervoja Esperantisto, kiu ne plenumis la interkonsentitan regulan eldonadon de la nomita gazeto, ni petas, ke niaj novaj pacienculoj ankoraŭ kelkajn semajnojn, ĉar nia Asocio baldaŭ posedos oficialan, regule aperantan gazeton: »La Fervojisto«, kiun eldonos s-ro Marich en Budapeŝt IX., Ullöt ut 59, IV.-8. La gazeto estas per ĉiu membro de I. A. E. F. deviga. Tial atendu do la unuan numeron por la jaroj 1922—1923, kie troviĝos la detalaĵoj pri la abonpago k. t. p. Por efektiviĝi malfacilan taskon, per kiu oni konfidis nin en Helsinko, ni bezonas ne nur moralan helpon, sed ankaŭ monon! Pro tio ni insiste petas ĉiun nian membron, ke li alvarbu novajn membrojn kaj pagu la kotizaĵon por la jaro 1923. Ĉiun monon oni sendu al nia ĉefa kasisto: Emanuel Kubásek, Plzeň, Prov. domy skup. B-I-68. Ĉeĥoslovakio. — La komitato de la I. A. E. F.

## BIBLIOGRAFIO

FIRST STEPS IN ESPERANTO. Facila lernolibro de Esperanto por infanoj kaj komencantoj anglalingvaj; verkita de Montagu C. Butler, sekretario de la Brita Esperantista Asocio. Prezo: 9 pencoj; fleksebla folo 1 ŝilingo. Ricevebla ĉe la B. E. A., 17 Hart Street, London, W. C. 1. — La aŭtoro celis obei la jenajn principojn; instrui la

facilan antaŭ ol la maloftan, kaj nur unu aferon en unu fojo: tre simple gradigante la instruon laŭ la vidpunkto de la komencanto anglalingva.

**La demando pri la plibonigo de la Muzikskribo** kaj ĝia solvo per la Aŭtonoma Muziknotado, de L. Cogen. Okpaĝa broŝuro eldonita de »Belga Esperantisto«. Kosto: Fr. 0.50 (2 respondkuponoj). — Broŝurforma eldono de ekstreme interesa artikolo aperinta en »Belga Esperantisto« kaj originale verkita de jam malnova samideano. Ĝi enhavas mallongan historion de la deveno kaj evolucio de la ordinara muziknotado kaj de la ĉefaj provoj por plibonigi kaj plisimpligi ĝin. Post kritiko de la bonaĵoj kaj difektoj de tiuj diversaj skriboj, la aŭtoro klarigas, kun seneblaj simpatio kaj entuziasmo, la sistemon de s-ro Jean Hautstont (la Aŭtonoman Muziknotadon), kiun li nomas »La Esperanto« inter la diversaj provoj, t. e. la nura vera solvo de l' problemo. La legado de tiuj bonege verkita libreto certe multe interesos ĉiujn personojn iom scivolemajn al novaj eltrovaĵoj.

....

## LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. Pech, Plzeň, Houšková ul. 4.)

**Laborista ligo esp. en Ĉeĥoslovakio, centra sidejo en Plzeň**, atentigas ĉiujn gekamaradojn, ke tujjara ĝenerala kunveno okazos 18an februaron je la 9a horo matene en »Popola scenejo« de laborista domo »Peklo«, Plzeň. Ĉiuj delegitoj de la sekcioj preparu la raportojn. Geanoj venu kiel eble multnombre por interkonatiĝi. Ĝis la revido!

**Sekcio Plzeň I.** Sabaton la 17. de decembro festis kaj rememorigis sekcio Plzeň I. naskiĝtagon de majstro Dr. L. Zamenhof per solena akademio en lab. domo »Peklo« en »Popola scenejo«, kiu estis riĉe ornamita per flagoj de diversaj nacioj. Mallongan festparoladon diris k-do J. Pech, klarigante al ĝeĉestantoj (ankaŭ neesperantistoj) en esp. kaj ĉeĥa lingvo la utilecon kaj necesecon de esp. por ni, laboristoj. Grandnombre ĉeestis esperantistoj el Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo. Dum la parolado li interpretis saluton de Finnaj esp., kiel partoprenanto de XIV. kongreso en Finnlando. Poste sekvis tre riĉa programo en ĉeĥa kaj esp. lingvoj, kiu konsistis el koncerto, recitado, humorajoj kaj unuakta komedio. Multan ĝojecon kaj ridegadon kaŭzis la ludo de teatraĵo »Solecaj animoj«. Esperantaj geaktoristoj (volontuloj) ludis per tuta vervo kaj ilia flua esp. parolado ĉiujn surprizis. Post fino riĉa aplaŭdo de ĉeestantaro estis al ili rekompenco. Vere oni devas diri, ke la festkomitato de sekcio Plzeň I. faris ĉion por amuzigi siajn gastojn. Dankon al ĉiuj kunludantoj, ankaŭ al muzikistoj de kvarteto, kiu ludis la himnojn »Al la fratoj« kaj »La espero«, kiun transskribis por la kvarteto s-o J. Horák, kapelestro, al kiu ankaŭ apartenas nia sincera danko. La gajaj horoj rapide pasis kaj ni plezure kun bondeziro, ke baldaŭ okazu io simila, forlasis la festejon post la 12. horo nokte.

**Lab. ligo esp.** aranĝis kun poŝtistoj 10. decembron en bio »Edene« propagandan paroladon de k-do J. Pech, akompanatan de 150 lumbildoj: »Vojaĝo al la lando de noktomeza suno.« La pa-

rolado estis tre interesa. Parolinto (delegito de Lab. ligo esp. por XIV. kongreso) gvidis nin el Plzeň trans Ĉeĥoslovakaj limoj en Germanujon. Ni ekvidis Leipzig-on, ĉefurbon Berlin kaj havenon Stetin. Poste ni veturis per vaporŝipo trans la Baltika maro, dumvojaĝe ni vizitis Tallin, ĉefurbon de Estonio, kaj de tie poste ni atingis Helsinko, la Esperantujojn de la XIV. Post la fino de la kongreso ni vizitis Viipuri, la plej malnovan, historian urbon en Finnlando. Poste ni forveturis al plej granda akvofalo en Eŭropo, Imatra, ktp. Kvankam la paroladon vizitis kelkaj centoj da homoj, la gajno ne estis granda, ĉar luprezo de la halo kaj elspezo por aŭto ktp. estis preskaŭ mil kronoj, sed malgraŭ tio ni estas tute kontentaj, precipe rilate al propagando. La ŝaman tagon posttagmeze forveturis k-do Pech en urbon Dobřany, kie estis en al urba kinematografo aranĝita la sama parolado.

## Praktika Laboro

en la Laborista Esp.-Movado.

Por praktike utiligi Esperanton al la laborista movado la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj starigis komisionon nomitan Nederlanda Laborista Esperanto-Servo.

Tiu Servo deziras ricevi el la eksterlando interesajn publikindajn sciigojn raportojn aŭ artikolojn pri socialaj, ekonomiaj aŭ politikaj okazintaĵoj kaj situacioj por traduki ilin kaj publikigi en la Nederlandaj laboristaj gazetoj. Reciproke ĝi estas preta sendi sciigojn k. t. p. por publikigo en eksterlandaj gazetoj laboristaj.

Por tio ni serĉas en ĉiuj landoj, escepte Anglujo, Francujo kaj Germanujo, spertajn kapablajn kamaradojn, kiuj povos helpi nin tiurilate.

Kamaradoj tutmondaj! Nur per praktikaj provoj ni povos konvinki la laboristojn pri la utilo de nia lingvo. Por tio ni kunigu niajn fortojn.

Starigu ankaŭ en viaj landoj similan instituton aŭ laboru individue por tiu ĉi praktika laboro.

Ĉiuokaze ni esperas, ke ĉiu laborist-Esperantisto, kiu povos, helpos nin!

Se vi volas tion, skribu al la

## Ned. Lab. Esp. Servo

Sekr.: G. P. Bruin, Alleeweg 9, Enschede (Holand).

Ĉiuj Esp. gazetoj bonvolu represigi ĉi tiun alvokon.

**Via horloĝo funkcios precize** se vi ĝin donos por rebonigi al

**FR. NOVÁK,**  
horloĝisto en Praha I.  
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4.-, afranki J. Kč 5.-, 1000 pec. Kč 35te afrankite Kč 37.50. -.



Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.

